

Esperanto 1951

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

„Heredajo kaj
kontinueco“

•
Impona
programo

•
Por pli bona
planado

•
Kredo de la
herooj

•
Literaturo, arto
kulturo

•
Organiza vivo

•
Verdaj steletoj

•
Monda
E-turismo





„HEREDAĴO KAJ KONTINUECO“

En la regiono de urbo Ŝumen, kie antaŭ dek tri jarcentoj hiano Asparuh imperitive diris la historiajn vortojn: «Tie ĉi estos la bulgara ŝtato», ĉiu ŝtono kaj ĉiu manlongo da tero estas mutaj atestantoj de la majesta kaj glora vojo de la bulgara popolo tra la jarcentoj.

La rokoj de Madara eĥas la paŝbruo de la rajdanto-militisto, transformiginta en simbolon de liberamo kaj firma volo por la bulgaroj. Super Granda Preslav trembrilas la lumo de la senmorta faro de plejado da literaturistoj, kreintaj la unuan «oran jarcenton» de Bulgario. En tiu kara por ĉiu bulgaro loko, kie kunigas pasinteco, nuntempo kaj estonteco, je la 28-a de novembro pasintjare, por la solena festado de la dekdua jubilea tago de Bulgario, nomita «Heredaĵo kaj kontinueco», kunvenis miloj da laboruloj.

La solenan festadon partoprenis la ĝenerala sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario Todor Jivkov kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj.

Dum la solena kunveno Todor Jivkov faris festparolon. Interalie li diris:

«Pasoj jaroj, naskigos novaj generacioj, sed por ni ĉiuj la posteuloj diros: ili estis la feliĉuloj — samtempuloj de la 1300-jara jubileo de Bulgario! Ili estis la konstruantoj de la dekkvara jarcento de Bulgario, jarcento socialisma kaj komunisma!»

Ni estas fieraj, ke ni havis la honoron genufleksi antaŭ la Jaro Unua de patrino Bulgario.

Ni ne povis ne veni tien ĉi, kie estis ĝiaj unuaj ĉefurboj, kie potenca imperio kiel Bizanco estis devigita rekonii la matenon de nia ŝtato, kie en kruelaj bataloj niaj antaŭuloj per militis lokon sub la suno por la brava bulgara popolo, al kiu la sorto destinis vivi eterne kaj prosperi!

Ni ne povis ne veni tien ĉi, kie la posteuloj de Ĉirilo kaj Metodij ĵetis la semojn de la bulgara parolo: kie la bulgara literaturo estis kronita per sia unua «Ora jarcento»; de tie disvastiĝis tra la mondo la bulgaraj skribo kaj kulturo.

Dum pluraj jarcentoj la bulgaroj revis kaj batalis por homaj rajtoj. Nun ili posedas tiajn rajtojn!

Dum pluraj jarcentoj la bulgaroj batalis por popola libero, kaj nun ili havas la revatan liberon!

Dum pluraj jarcentoj la bulgara popolo revis kaj batalis por la rajto de krea laboro, de scioj, kulturo kaj spirita lumo. Nun ĝi disponas pri ĉio ĉi!

Guste tial ni kun des pli granda forto konscias kaj sentas la profundan ligan kaj kontinuecon inter ĉiuj generacioj. Ĉiuj donis sian kontribuon en la batalo por sociala justeco kaj nacia sendependeco, por ĉiulanka progreso de la bulgara popolo.»





BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51

JANUARO

1•1982

IMPONA PROGRAMO POR EVOLUO KAJ PROGRESO

La laborema bulgara popolo renkontis la novan jaron 1982 kun helaj perspektivoj por plua fruktodona disvolvigo de ĉiuj branĉoj de la ekonomia kaj kultura vivo kaj por altigo de ĝiaj vivnivelo kaj bonstato.

Sesio de la Oka Parlamento, okazinta en decembro pasintjara, akceptis gravajn ŝtatajn dokumentojn: la Unuecan planon por soci-ekonomia evoluo de la lando dum la Oka jarkvino kaj la planon kaj la budĝeton por 1982, kiuj antaŭvidas realajn perspektivojn por la progreso de socialisma Bulgario.

La plano por la Oka jarkvino estas ellaborita konforme al la decidoj de la XII-a kongreso de Bulgara Komunista Partio, kiu alte taksis la rimarkindajn akiraĵojn de nia lando dum la lasta jardeko kaj speciale dum la Sepa jarkvino kaj la taskojn de soci-ekonomia evoluo de Bulgario ĝis 1990.

Kiuj estas la ĉefaj direktoj de la ĝenerala plano por plua prospero?

EVOLUO DE LA MATERIALA-TEKNIKA BAZO

Oni antaŭvidas, ke la nacia enspezo kreskos per proksimume 20 procentoj:

— la amplekso de la industria produktado kreskos per 28 procentoj kaj en 1982 — per 4,5 procentoj;

— la agrikultura produktado kreskos dum la jarkvino per 18% kaj per proksimume 2,2% en 1982.

Dank' al la akumulado de financaj kaj materialaj rimedoj, kiuj prezentos 25% de la nacia enspezo, dum la Oka jarkvino la ŝtato disponos pri grandaj fontoj por kapitalinvestoj je sumo de proksimume 37 miliardoj da levoj, el kiuj ĉirkaŭ 27 miliardoj da levoj estos direktitaj por evoluigo de la materiala produktado kaj pli ol 10 miliardoj da levoj — por la sociala sfero. Tio signifas konsiderindan plialtigon de la ekonomia nivelo de la lando pere de plua produktado de industriaj kaj agrikulturaj produktoj je unuopulo de la loĝantaro, ekzemple: ĝis 1985 la produktado de

elektroenergio atingos 5000 kilovathorojn; de nigraj metaloj — 420 kg; de sulfurado — 150 kg; de kemiaj sterkoj — 140 kg; de sintetikaj peĉoj — 50 kg; de cemento — 750 kg; de cerealoj — 1100 kg, ktp.

PLUA PLIALTIGO DE LA VIVNIVelo DE LA LOĜANTARO

La zorgo pri ĉiu aparta membro de nia socialisma socio estas fundamenta tasko kaj celo de la multflanka agado de la Bulgara Komunista Partio, de ĝia sociala politiko. Ĝi antaŭvidas kreskon de la realaj enspezoj de la loĝantaro dum la jarkvino per 15 procentoj kaj en 1982 — per 3%. Rezulte de tio plialtiĝas ankaŭ la aĉetpovo kaj la grado de kontentigo de la materialaj, kulturaj kaj socialaj bezonoj de la popolo. La ĉefa fonto de enspezoj por la loĝantaro — la salajro, de 182 levoj meze monate en 1980, atingos 209 levojn en 1985. La minimuma monata salajro al la fino de la jarkvino estos jam 120 levoj.

Kreskos ankaŭ la rimedoj por plibonigo de la sanprotektado, por klerigo, kulturo, sporto kaj turismo. En la plano oni antaŭvidas plialtigon jam en 1982 de la minimumaj pensioj de la vilaĝanoj-kooperativanoj, atingintaj 70-jaran aĝon. Al la fino de la Oka jarkvino la minimuma pensio en nia lando estos egala al la duono de la minimuma monata salajro.

Ĉiam pli kreskos la tutjara kaj regula provizado de la loĝantaro per diversspecaj kaj bonkvalitaj varoj, kies produktado ankaŭ kreskos kaj plibonigos. Tio ja estos garantio por realigo de la sociala politiko de la partio kaj de la registaro kaj por la senĉesa perfektigo de la socialaj strukturoj. Kompare kun 1980, en 1985 la konsumado de iuj gravaj nutraĵoj je unuopulo de la loĝantaro konsiderinde kreskos. Respektive kreskos la produktado de ŝuoj, vestoj, mebloj kaj de multaj aliaj varoj por ĉiutaga konsumado kaj uzado. Dum la jarkvino plialtiĝos

ankaŭ la reto de laborejoj por teknikaj servoj al la loĝantaro. Iu el la plej gravaj eroj de la kvinjara ekonomia plano estas la vigla kaj plibonigita konstruado de loĝdomoj. Nur en 1982 estas antaŭvidita la konstruado de 72 600 novaj loĝejoj kaj ĝis la fino de la jarkvino ties nombro estos 360 000.


Dum la Oka jarkvino plibonigos ankaŭ la zorgoj pri la infanoj kaj kreskos la nombro de infandomoj kaj vartejoj. Al ĉiuj 5-jaraj infanoj estos garantiita loko en la infandomoj konekse kun ilia enskribo en la unua klaso je 6-jara aĝo.

Estas garantiitaj kondiĉoj por plua evoluo de la socialisma kulturo — konstruado de novaj teatroj, bibliotekoj kaj legejoj, plilargigo de la reto de amaskomunikiloj. En la sfero de sanprotektado kaj de sociala helpado multo estas farota: kreskos la nombro de kuracejoj, de ripozdomoj, plibonigos la kondiĉoj por amasa sporto kaj turismo, estos konstruitaj novaj sportaj kompleksoj kaj multaj novaj montodomoj.

Oni antaŭvidas kreskon de la nacia enspezo dum la Oka jarkvino per ĉirkaŭ 20 procentoj — la amplekso de la industria produktado dum la jarkvino kreskos per 28 procentoj, kaj en 1982 — per 4,5 procentoj.

— la produktokvanto de la kamparmastrumo, laŭ la antaŭvidoj, devas kreski dum la jarkvino per ĉirkaŭ 18 procentoj kaj per ĉirkaŭ 2,2 procentoj en 1982.

Dum la jarkvino oni garantios kreskon de la realaj enspezoj de la loĝantaro per 15 procentoj



Estas ellaborita speciala programo por plilargigo de la urba kaj interurba aŭto- kaj fervojtransporto.

En la plano estas apartigita speciala loko al la konservado kaj purigado de la naturmedio.

PLUA INTENSIGO DE LA SCIENC-TEKNIKA PROGRESO

La senĉesa intensigo de la materiala-teknika bazo estas la ĉefa direkto de la soci-ekonomia evoluo de nia lando. Pro tio en la akceptita Oka kvinjara plano estas antaŭviditaj kapitalaj investoj por stabiligo kaj evoluigo de la strategiaj branĉoj de la peza industrio — metalurgio, maŝinkonstruado kaj kemia industrio, plilargigo de la energiaj fontoj, de la tutlanda industrio, kies produktadeblecoj fine de la kvinjara periodo multoble plialtigos.


La budĝetelspezoj por socialaj kaj kulturaj bezonoj superas 5587 milionoj da levoj:

— por pensioj en la projekto de budĝeto estas antaŭviditaj 2006 milionoj da levoj.

— por socialaj helpoj — ĉe gravedeco, nasko kaj flegado de infanoj — estas antaŭviditaj 394 milionoj da levoj.

Generale por financado de ĉiuspecaj entreprenoj en la sfero de klerigado en la projektoplano estas antaŭviditaj 1308,5 milionoj da levoj.

La ĝenerala kvinjara plano kaj la budĝeto por 1982, akceptitaj de la Parlamento, estas fundamentaj ŝtataj dokumentoj por plua progreso de la popola bonstato. Ili garantias la materialan kaj teknikan bazon de nia evoluanta kaj matura socialisma socio kaj la kondiĉojn por transiro al pli alta socia kategorio — al konstruado de la fundamentoj de la komunisma socio en nia lando.



POR PLI BONA PLANADO

inĝ. P. TODOROV — vicprezidanto de BEA

Solvado de soci-ekonomiaj kaj kulturaj taskoj lige kun la decido de la XII kongreso de la Bulgara Komunista Partio, senlaca laboro por pli gravaj atingoj en la konstruado de evoluanta socialisma socio, utiligante la eblecojn de la Internacia Lingvo — ĉio ĉi estas la fundamento, sur kiu estas ellaborita la kompleksa programo por agado de la Bulgara Esperantista Asocio en la periodo 1981—1984. Ĝi montriĝas nova momento en la laboro de BEA kaj de ĝiaj organizaj unuoj. La kompleksa programo inkludas la elementojn prognozato kaj programado.

Ju pli bone ni scias prognozi, des pli bone, pli facile kaj pli plene ni povos programi. Niaj plan-programoj surloke estas des pli realaj kaj ampleksaj, ju pli bone ni konas la rolon kaj la lokon de Esperanto en la vivo, la metodojn de instruado, la akordigon de teorio kaj praktika aplikado, la realan difinon de la loko de Esperanto inter la naciaj lingvoj!

Cefa trajto de nia nuntempo estas rapida supreniro de la scienco kaj tekniko. Ili estas la bazo de moderna komunikado, esplorado kaj ekspluatado de la naturriĉaĵoj, marprofundaĵoj, kosmaj spacoj, garantias grandajn sukcesojn en la sfero de plialtigo de la vivnivelo, sanprotektado, plilongigo de la vivo, interŝanĝon de kolosa laŭ amplekso informado.

Tial la grava demando — pri plej konvenaj apliksferejoj kaj enpenetro de la Internacia Lingvo en la vivon de la socio, ricevas logikan respondon: Esperanto — unualoke en la scienco kaj tekniko, por sciencaj esploroj kaj interŝanĝado de sperto! Konekse kun tiu ĉi ĝenerala linio sian multflankan propagandinforman, instru-klerigan kaj lingvistikan aktivecon la esperantistoj devas meti sur scienca bazo.

La estonta evoluo de la Esperanto-movado evidente formiĝos en kvar bazaj direktoj: 1) Instruado kaj edukado, 2) Aplikado, 3) Rimedoj, 4) Informado.

La unua punkto inkludas verkadon de novaj lernolibroj, novajn ĉeestajn kaj forestajn kursojn, TV-kursojn ktp.

Punkto dua devas montri la kampojn por aplikado de Esperanto: a) Faka scienca agado en la sfero de medicino, matematiko, geologio, maŝinkonstruado k. a.; b) Kulturo kaj socia vivo; c) Komerco; d) Sporto kaj turismo.

La rimedoj ankaŭ ludas gravan rolon. Tio ĉi estas sociologiaj esploroj, institucioj kaj komisionoj, turismaj servoj, E-asocioj k. a.

La kvara baza direkto estas informado. Ĝiaj du aspektoj — enlanda kaj eksterlanda — estas egale gravaj. Per la ĵurnaloj, radio, televido ktp. oni preparas pli bonan bazon por progreso de la movado. La pli oftaj kaj intimaj kontaktoj kun ĵurnalistoj, oficistoj, muzikistoj, politikistoj helpas por pli ĝusta kaj efika formado de la socia opinio rilate al Esperanto.

Tiamaniere organizita, programita kaj planita, la E-movado facile povus agordiĝi kun la planoj de aliaj institucioj. Ekzistas ankaŭ internaciaj avantaĝoj — simila formo de organizado kaj planado helpas la ĝeneralajn internaciajn organizaĵojn, respektive UEA, pli facile koordini, gvidi kaj asimili la realajn atingojn. Imitinda estas la gravega sukceso de niaj samideanoj el GDR, dank'al kies laboro kaj sugesto la sciencistoj-lingvistoj pozitive rilatas al la propono esplori la ecojn de Esperanto, ne konsiderante ĝiajn fincelojn!

La bulgaraj esperantistoj, organizitaj en BEA, havas longdaŭran laborprogramon, ellaboritan de ĝia Centra Estraro. La programo entenas: kulturklerigajn aranĝojn, organizajn problemojn, libroeldonadon, lingvistikajn demandojn kaj internaciajn aranĝojn.

La distriktaj estraroj de BEA, ĝiaj fakaj sekcioj de fervojistoj, poŝtistoj, medicinistoj k. a., la sociataj kaj la klubaj estraroj tute facile povas orientiĝi kaj (laŭ la lokaj kondiĉoj, eblecoj kaj organizkapabloj) devas prepari siajn longdaŭrajn planprogramojn. Kompreneble, ĉi-jare ekzistas kelkaj tre gravaj E-aranĝoj: junularaj E-festivaloj, Botev-recitalo, seminarioj okaze de la 100-jara datreveno de la naskigo de Georgi Dimitrov kaj la 75-jara datreveno de la fondiĝo de BEA, E-renkontiĝoj kaj kursoj por plialtigo de la instrukapablo, plenkursidoj de CE de BEA, partopreno en la kongresoj de MEM, TEJO, IFEF, en la Internaciaj Kongresaj Universitatoj, internaciaj junularaj seminarioj, fak-konferencoj kaj multaj aliaj.

Ni ne forgesu, ke la akurataj kaj aktualaj planprogramoj, konformigitaj al la lokaj eblecoj, garantios kvindekprocentan sukceson de ĉiu aparta aranĝo!

Karaj geesperantistoj, en la komenco de la Nova 1982 jaro ni bondeziras al vi sanon kaj feliĉon kaj novajn grandajn sukcesojn en via utila agado por plialtigo de la prestiĝo de Bulgara Esperantista Asocio kaj en via nobla batalo por daŭra paco!

LA KREDO DE LA HEROOJ

Tiuj, kiuj antaŭ duonjarcento metis la fundamenton de Bulgara Laborista Esperantista Asocio (BuLEA, manifestis klarvidecon. Ili jam tiam skizis la grandan progreseman rolon, kiun povus plenumi la esperantistoj, se ili ligus la esperantistan movadon kun la sociaj ideoj por konstruado de nova socio de la sociala progreso, la amikeco kaj la paco inter la popoloj, por ebligi al la homa kulturo kaj civilizo atingi nesupozite altajn suprojn. En similaj kondiĉoj estos kreitaj la plej favoraj cirkonstancoj por la aplikado de la internacia lingvo Esperanto por plej kompleksa kontaktado inter la popoloj de la tuta terglobo, por laŭgrada kreado de socialisma kulturo kiel laŭ enhavo, tiel ankaŭ laŭ formo — en vaste uzata internacia lingvo.

Estas granda feliĉo por la fondintoj de BuLEA la cirkonstanco, ke ties vojo estis lumigata de la marksismaj-leninismaj ideoj, ĉar alimaniere, senigitaj de konsekvence-scienca mondkoncepto, ili ne povus orientiĝi kiel en la plej proksimaj taskoj de la laborista Esperanto-movado, tiel ankaŭ en ĝia perspektiva evoluado dum jardekoj antaŭen.

La nuntempa bulgara Esperanto-movado sub la popola regpotenco estas feliĉa daŭrigo de ĉiuj plej bonaj momentoj el la evoluado de BuLEA. Ne hazarde frunte de la libera Esperanto-movado en

nia lando post la popola venko je la Naŭa de septembro 1944 ekstaris la saviĝintaj de pereco aktivuloj de BuLEA. Tiu kontinueco donis sian pozitivan reflektan, kiam oni devis difini la karakteron kaj la taskojn de Bulgara Esperantista Asocio. Kaj se hodiaŭ BEA funkcias kiel organizaĵo kun firma aŭtoritato, kiel enlande, tiel ankaŭ en la medioj de la internacia Esperanto-movado, tio tute ne estas hazardaĵo. Tio estas rezulto de la pionira agado de tiuj aktivuloj, kiuj ŝparis nek siajn fortojn, junecon, energion, nek eĉ siajn santon, liberon kaj vivon, kiam ili konstruadis BuLEA kaj sub ties standardo gvidis heroajn luktojn.

Se hodiaŭ nia Esperanto-movado ĝuas unuarangan rolon en la agado de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), tio ankaŭ estas rezulto de la ĝusta orientiĝo de la plej progresema parto de la bulgara esperantista movado, startinta jam en la dudekaj jaroj de la nuna jarcento, kiam formiĝis la revolucia Esperanto-movado en Bulgario, kristaliginta en BuLEA.

Ĉi-sube la iamaj aktivuloj de BuLEA — NIKOLA ALEKSIEV — honora prezidanto de MEM, kaj HRISTO GOROV — prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, dediĉas siajn rememorojn al du el la elstaraj gvidantoj de BuLEA kaj ardaĵ batalantoj kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo en Bulgario, martire pereintaj antaŭ 40 jaroj.

МЕЖДУНАРОДЕН ЕЗИКЪ

ИЗДАНИЕ НА РАБОТ. ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗЪ ВЪ БЪЛГАРИЯ

ГОД. АБОНАМЕНТЪ 20 лв.
БРОЙ 2 ЛЕВА
ИЗДАВА НА 1 И 15 ЧАСЪО

ПРОДЪЛЖАМИ ОТЪ ВСИЧКИ СТРАНИ. СЪЕДИНЯВАЙТЕ СЕ!

ГОДИНА ПЪРВА — БРОЙ 10
АДРЕСЪ:
М. Българ, Народ. ул. М. София 33

СОФИЯ, 1 МАРТЪ 1932 г.

Преправено: Јули „МЕЖДУНАРОДЕН ЕЗИКЪ“ („LINGVO INTERNACIA“) нро 10, т. 1, двумајна елдона де LEA en Bulgario, Адрес: Булг. Народна ул. М. София 33.

„IUN TAGON VI KOMPRENOS. . .“



Nikola Sopov (1912—1941) estis tre helkolora junula figuro. Vigla, kuraga, movigema, senlaca, optimisma, ĉiam ridetanta. Facile li komunikis al la ceteraj sian gajan humoron. Li estis sci-avida kaj strebis kompletigi sian lernejan klercon. Li regule legis la laboristan gazeton, ŝatis la belartan literaturon. Kun granda entuziasmo li komencis lerni Esperanton.

En la epoko de kapitalismo kaj faŝismo la laboristo estis taksata kiel simpla instrumento, kapabla liveri al la kapitalisto pli altajn profitojn. Neniu oficiala organo zorgis pri altigo de la kulturo de la laborista klaso. En tiuj kondiĉoj oni povas pli ĝuste pritaksi la strebon de Sopov al pli alta kultura evoluado. Li laboris en fabriko por helpi la vivtendan de granda laborista familio, memklerigis sin, ŝiris de sia ne sufiĉa libera tempo por aktivado en la laboristaj organizoj. Li okupiĝis per lernado de fremda lingvo (Esperanto) antaŭ ol havi la eblecon pli profunde ellerni la gepatran lingvon. Tion povas fari nur junulo laŭnature inteligenta, kun forta volo kaj konscia disciplino.

Tiutempe la kapitalistoj kaj la polico traktis ĉiun pli konscian laboriston kiel suspektindan personon, aktivan aŭ potencialan tumultulon, malkontentulon. Tial la polico persekutis ankaŭ tiujn, kiuj vizitis kursojn de Esperanto, organizitajn de Laborista Esperanto-Asocio. Ja en tiuj kursoj la instruado de la lingvo estis ligita kun ideoj pri internaciismo, pri amikeco inter la popoloj, pri pacbatalo. Esperanto, laŭ sia karaktero mem,

jam signifis orientigon kontraŭ predikado de rasismo, ŝovinismo kaj faŝismo. La polic-organoj estis bone informitaj pri ĉio ĉi. Ankaŭ la klas-sento de la kapitalistaro bone orientis tiujn rondojn en faŝista Bulgario pri la „minaco“ fare de la esperantistaro. Estis kontrolata eĉ la oficiala neŭtrala Esperanto-asocio, ĝin oni premis ekiri laŭ faŝisma vojo. Tiuj provoj fiaskis, sed ili estis multsignifaj.

Nikola Sopov sciis anticipe, ke la lernado de Esperanto ne prezentos simplan kaj trankvilan kulturen okupon. Tamen spite al ĉio li plej disciplinite vizitis la kurson kaj lernis diligente. La entuziasmo kaj diligentecon de Sopov altiris la atenton de CK de BuLEA (Bulgara Laborista Esperanto-Asocio). Post la fino de la kurso li estis altirita por organiza laboro en la Sofia sekcio de BuLEA.

Por la rapida politika kaj kultura progreso de Sopov kontribuis serioze ankaŭ lia proleta familia medio kaj la atmosfero de la laborista urboparto „Juĉbunar“. Tie ofte okazis laboristaj protestdemonstracioj. Tiu kvartalo estis fortikaĵo de la komunista movado en nia ĉefurbo. Ja tie kreskis kaj formiĝis ankaŭ Georgi Dimitrov, kies domo estas nun mondfama Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov“. En tiu periodo Sopov formis sian revolucionan karakteron. Tial estas tre nature, ke en la sama urboparto nun troviĝas strato portanta lian nomon.

En tiu kvartalo funkciis publika legejo „Hristo Botev“. Gi farigis aktiva centro de politika kaj kultura agado. En ĝia salono ĉiuj demokratiaj kaj aliaj progresemaj organizoj efektivigis diversajn kulturajn aranĝojn. La ĉefe laborista, precipe junulara publiko aŭskultis prelegojn de elstaraj personoj de la laborista kulturfronto, ĉeestis literaturajn legadojn de junaj, sed jam popularaj proletaj verkistoj, artistoj, ĵurnalistoj k.a. reprezentantoj de antifaŝistaj kaj progresemaj kulturrondoj. La ideoj diskutoj, la atmosfero de sincera strebado al malkovro de politikaj kaj sociaj valoraj helpis konsiderinde la ĉefurban junularon evoluigi ideoj kaj politike siajn revolucionajn kvalitojn.

Ne mirige, ke Nikola Sopov kreskis en la laborista movado ne dum tagoj, sed dum horoj. La streĉa politika situacio en la lando kaj pli speciale en Sofio, kiel ĝia natura centro, elforgis en mallonga tempo el persono kiel Nikola Sopov fidindan laboristan funkciulon. Post mia aresto kaj malliberigo li estis elektita sekretario de la Centra Komitato de BuLEA. Li tute pravigis la al li esprimitan fidon.

En la periodo de la Dua Mondmilito li partoprenis la agadon de sabota grupo frunte kun Nikola Botuŝev. Perfida provokisto faciligis la policon aresti la tutan grupon. Post la kutima torturado Botuŝev, Sopov kaj kelkaj aliaj estis pendigitaj. La ekzekutistoj forprenis lian vivon, sed lia ekzemplo de patrioto-internaciisto restis en la memoro de nia dankoplena popolo.

En sia prizona taglibro Nikola Sopov skri-

bis al siaj du filetoj: „Miaj karegaj infanoj, via patro tre amas vin. Nur pri vi mi pensas, tamen estas necese morti. Iun tagon vi komprenos kial pereis via patro. Memoru, ke en via persono via patro amis la tutan popolon kaj en la popolo li vidis vin! Mi mortas, miaj karegaj, por ke vi povu vivi.“

Antaŭ kvardek jaroj fiere pereis la popola heroo.

N. ALEKSIEV

„Ankaŭ ĉi tie estas fronto!...“

Unufoje la morto etendis sian ostan manon al Nikola Botuŝev, kiam li estis en aĝo de dudek jaroj. Tiam li servis kiel adjunkto ĉe divizia stabo. Lia tasko estis ricevi depeŝojn, kiujn sendadis la militregistaro. En tiuj depeŝoj temis interalie pri la revolucio en Ruslando. Botuŝev simpatiis al bolŝevistoj kaj informis siajn kamaradojn pri la okazaĵoj en tiu lando. La soldatoj sincere aprobis la sloganon de Lenin: „Pacon sen kontribucioj!“ Iu spiono denuncis la junan Nikola kaj oni starigis lin antaŭ la milittribunalo. La juĝistoj eldiris kruelan verdikton pri mortpafo.

Botuŝev devis atendi konfirmon de la verdikto en la sofia malliberejo. Dum li restadis en la karcero, eksplodis soldata ribelo ĉe la suda fronto. Dekmiloj da soldatoj sin direktis al Sofio por detronigi la caron kaj puni la registaron, kiu jetis la bulgaran popolon en neniigan militon. Tamen dek kilometrojn sude de Sofio la ribelintaj soldatoj estis haltigitaj de germanaj milittrupoj kaj senarmigitaj. Oni plenŝtopis la malliberejojn de Sofio je kaptitaj soldatoj. Botuŝev enmiksiĝis sin en la amason kaj oni perdis liajn postsignojn.

La nova registaro amnestiis la ribelintojn. Amnestiita estis ankaŭ Nikola Botuŝev. Li veturis al Plovdiv kaj eklaboris en vegetara restoracio. Dum la liberaj horoj li plu perfektigis en Esperanto, kiun li lernis kiel gimnaziano en sia naskiĝurbo Sliven. La restoracio similis al politika klubo, kie kunvenis homoj de diversaj ideologiaj konvinkoj, kaj arde inter si diskutis. La politika polico baldaŭ fermis la pordojn de la restoracio.

Botuŝev veturis al sia frato en Burgas. En apuda vilaĝo li eklaboris ĉe draŝmaŝino. Eksciinte de sia frato, ke la komunista partio preparas ribelon, li revenis al Plovdiv

kaj aligis al la ribelintoj. Tamen la ribelo estis frakasita kaj Botuŝev aligis al partizana taĉmento en Balkanmontaro. Ĉe atako de armiltenejo oni lin arestis. Denove la osta mano etendis sin al Nikola Botuŝev. Oni ne sukcesis mortigi lin, ĉar la tuta eŭropa proletaro kaj intelektularo kaploke kun Henri Barbusse protestis kontraŭ la amasaj murdoj en nia lando. Post sep jaroj, pasigitaj en diversaj malliberejoj, Botuŝev spiris libere.

Dek jarojn li batalis en la vicoj de la partio kontraŭ faŝismo kaj kapitalisma ekspluatado. Kiam en 1941 hitleraj armeoj okupis nian landon kaj invadis Sovet-Union, Botuŝev organizis batalgrupojn kaj diris al siaj kamaradoj:

— Tiu ĉi milito estas klasa. La fronto estas ĉie. Ankaŭ en Sofio.

La batalgrupoj de Botuŝev sabotis fabrikojn, maŝininstalaĵojn.

Trian fojon la osta mano de la morto etendis sin al lia kapo. La milittribunalo verdiktis lin pri mortpafo.

Tio okazis antaŭ 40 jaroj, kiam la faŝistoj furiozegis en nia lando. Botuŝev estis certa, ke oni ekzekutos lin, sed li ne timtremis antaŭ la morto. En sia lasta letero al la edzino kaj infanoj li skribis:

„Ankaŭ ĉi tie estas fronto. Trankvile mi atendas la morton, ĉar mi ĝin malamegas! Kaj tie, ĉe Moskvo kaj Leningrado — mi firme kredas en mia lasta minuto, starante sub la pendumilo, la Ruĝa Armeo preparas grandiozan venkon super la faŝista pesto!... La homaro proksimiĝas al sia savo! Kurage antaŭen!“

Lia profunda kredo je la Ruĝa Armeo ne trompis lin. Lian profundan kredon — la kredon de heroo Nikola Botuŝev — pravis la historio.

ĤRIMA



LA BULGARA JUNULARO EN SCIENCO KAJ TEKNIKO

En novembro pasintjare, en la foirurbo Plovdiv estis elmontritaj ekspozitaj, ellaboritaj de la partoprenantoj en la movado por Teknika kaj Scienca Kreado de la Junularo (TSKJ). Tiu deknua laŭvice ekspozicio estas fina etapo de dujara nacia revuo de la agado de 6216 kluboj de TSKJ, unuigintaj 938 038 mezlernejanojn, studentojn, junajn laboristojn, kamparlaborulojn, scienc-teknikan intelektularon el la tuta lando.

La ideo utiligi la scienc-teknikajn kapablojn de la junularo en ĉiuj sferoj de la nacia ekonomio naskiĝis en urbo Gabrovo. Antaŭ 14 jaroj grupo da junaj inĝenieroj kaj laboristoj el la fabriko de industria elektroniko decidis okupiĝi dum eksterlabora tempo pri la nesolvitaj problemoj de la fabrika produktado. Baldaŭ al la sama ideo aliĝis ankaŭ junuloj el aliaj grandaj gabrovaj entreprenoj. La fabrikaj estraroj disponigis al ili la necesan eksperimentan kaj produktadan bazon.

La unuaj rezultatoj de la agado de la gabrovaj kluboj por teknika kreado altiris la atenton de la Centra Komitato de Komsomolo. Estis decidite popularigi la ideon inter la junularo de la tuta lando, sed tiel, ke la klubaj formoj de teknika kaj scienca kreado ampleksu ĉiujn sferojn de junulara realigo — mezajn kaj superajn lernejojn, fabrikojn, scienc-esplorajn institutojn, agrikulturajn kooperativojn. Paralele kun tio estis preparita kaj konfirmita speciala decido de la Ministra Konsilantaro pri la statuto de la kluboj. Laŭ tiu registara dokumento la laborplanoj de la kluboj akordiĝas kun la planoj de la respektivaj entreprenoj aŭ sciencaj institutoj, celante disvolviĝon kaj pliperfektigon de la produktado aŭ de la scienca bazo. Tiamaniere estis legigita la financado de l'klubaj inventaĵoj kaj speciale la pagado konforme al la kontribuo de ĉiu junulo.

La gabrova iniciato transformiĝis en tutlandan junularan movadon. Nuntempe ĉiu dua lernanto kaj studento, ĉiu tria juna laboristo, ĉiu kvina juna laborulo en vilaĝo partoprenas la movadon de TSKJ. Nur dum la lastaj du jaroj la nombro de la kluboj de TSKJ kreskis al 424.

La agado de la kluboj de TSKJ estas planata depende de la aĝo kaj profesio de la junaj homoj. Por la pli junaj lernantoj tio estas rondoj kaj kluboj, kies agado estas direktita al ekposedo de fakscioj kun krea-aplika karaktero. En mezlernejoj, krom la kluboj, populara formo de kreado estas la „olimpikoj“ de matematiko, fiziko, kemio. La studenta kreado estas direktita precipe al solvo de produktadaj problemoj. La ekonomia rezultato de jam enkondukitaj en la produktadon inventaĵoj de studentoj nur dum la lastaj du jaroj atingis la sumon de pli ol 60 milionoj da levoj. La junaj scienc-laboristoj solvas antaŭ ĉio problemojn el la sfero de strategia direkto de la scienc-teknika progreso. Sufiĉe granda estas ilia kontribuo por kreo de novaj teknologioj kaj specimenoj, por plibonigo de la kvalito de l' produktataj varoj por solvo de la problemoj pri krudaĵoj, por plialtigo de la socia laborproduktiveco.

Al la junulara kreemo montras intereson estraroj de ministerioj, de industriaj asocioj, de fabrikoj. En la produktado jam estas enkondukitaj 60% de la eksponitaj tie ĉi inventaĵoj kaj racioj. La specialistoj opinias, ke ankaŭ la ceteraj 40% trovos aplikon. Multaj el la prezentitaj modeloj distingiĝas per sia alta teknika nivelo kaj trovas vastan aplikon en la praktiko.

La redakcio interesiĝas ĉu inter la anaro de la kluboj de TSKJ estas ankaŭ junaj geesperantistoj?

ANGELINA PETROVA

CIVITANO, PENTRISTO KAJ FILOZOFO

Nun, kiam pasis jam 80 jaroj de post la naskigo de la granda nacia pentroartisto Ilija Beŝkov, ĉiam pli klare estiĝas, ke li plenmerite okupas sian lokon inter la plej eminentaj reprezentantoj de la bulgara kulturo.

Ilija Beŝkov (1901—1958) kreas siajn unuajn verkojn post la Unua Mondmilito, kiam la klasbataloj de la proletaro kaj de la malriĉaj kamparanoj kontraŭ la reakciaj fortoj kreas akrajn konfliktojn en la socia vivo de Bulgario. Kun rimarkinda civitana kuraĝo la pentristo senmaskigas la maljustaĵojn de la burĝa ŝtato. Li kreas serion da karikaturoj, direktitaj kontraŭ la faŝisma reĝimo kaj kontraŭ la monarko mem („Saluton, Patrolando“, „Respondo al la tronparolo“, „Stelita konstitucio“, „Unuanima demokratio“, „La cara familio“ k. a.). Pli malfrue Beŝkov publikigas karikaturojn kontraŭ la hitlera „bruna pesto“, saturitajn de akra sarkasmo („Hispana kroniko“, „La kulturtorĉo de Goring“ k. a.).

Kun mirinda psikologia profundeco la pentristo prezentas siajn ĉefheroojn — ordinarajn laborantojn: laboristoj, malriĉaj kamparanoj, metilernantoj, kamposervistoj ktp.

Saturitaj de bonhumoro, sed plej ofte de akra sarkasmo estas liaj multnombraj satiraj pentraĵoj, prezentantaj scenojn el la ĉiutageco de la burĝaro. Per la rimedoj de la grafikarto Beŝkov sukcesas fari brilajn filozofiajn-belartajn sugestojn, rekreante la intiman vivon de la regantoj, iliajn mizerajn idealojn, egoismon, vantecon, indiferecon.

Ilija Beŝkov estas eminenta majstro de la ilustraĵo. Ankaŭ sur tiu ĉi kampo li kreas konvinkofortajn sociajn tipojn kaj individuajn homkarakterojn. Varia mondo de vivsituaĵoj, sociaj kaj psikologiaj konfliktoj



kaj intimaj animstatoj trovas lokon en liaj laŭ formato malgrandaj, sed riĉenhavaj toloj. En ili, dank' al sia potenca talento de majstro de la kolormagio, la pentristo manifestas belartajn ĝeneraligojn, kiujn atingas nur la plej grandaj majstroj de peniko kaj plumo.

La tuta grandega heredaĵo de Ilija Beŝkov, portanta la signojn de la granda arto kaj dediĉita al la vero, al la bono kaj la beleco, prezentas brilan ekzemplon de sindona kaj senprofita servado al la homoj, kiujn la granda pentristo sincere kaj profunde amis.

VELIČKO KOLARSKI

KONTRAKTO PRI KUNLABORO

Estis subskribita Kontrakto pri amikecaj rilatoj kaj kunlaborado inter DE de BEA en Vraca kaj E-Asocio en Kulturligo de GDR en Frankfurt (sur Oder).

La kontrakto celas profundigi la amikecajn rilatojn inter la du ĝemelaj distriktoj de Vraca kaj Frankfurt (O), kaj krome ebligi interŝanĝon de informoj pri E-movado en ambaŭ landoj.

Por efektivigo de la supre menciitaj (en 10 punktoj) iniciatoj oni antaŭvidas Interŝanĝon de laborplanoj kaj informoj, de gazetoj

kaj literaturo en Esperanto, de pedagogiaj spertoj pri instruado de Esperanto kaj de instruistoj kaj partoprenantoj en E-kursoj, aranĝon de reciproka gastado de esperantistoj el ambaŭ distriktoj, partoprenon en gravaj E-aranĝoj de la ĝemelaj distriktoj k. a.

Subskribis por DE de BEA en Vraca ties prezidanto Stojan Pavunĉev kaj por DE de E-Asocio en Kulturligo de GDR—Frankfurt (O) ties prezidanto Bärbel Kulisch.

ST. PAVUNĈEV

KONSCIENCO

Ekstere pluvas. Etguta pluvo, senĉese kaj ekde la matenigo. En la ĉambro tamen estas agrable varme. Jam estas tagmezo. Ni sidas ĉirkaŭ la tablo, sataj kaj kontentaj pro la afabla atento de la dommastrino — mia edzino.

Mia kuzo, kiu venis tagmanĝi kun ni, malrapide trinkas konjakon kaj elokvente rakontas diversajn okazintaĵojn el sia vivo.

— Tion, kion mi volas rakonti al vi nun, mi neniam ĝis nun rakontis al iu ajn — li diris — sed mi volas konfesi ankaŭ, ke mi neniam forgesos tiun travivaĵon.

— Nu, diru, rakontu! — mi petis lin. — Eble tio estos interesa.

— Ni estis tri kolegoj — li komencis — kaj devis labori en urbo S. kaj en iuj vilaĝoj en ties regiono. Grandan laboron ni plenumis kaj bonajn sukcesojn ni atingis. Proksimiĝis la tago por nia reveno en la ĉefurbon, kaj ni decidis „surverŝi“ la sukceson. Ni kolektiĝis en la domo de nia kolego el S. Ĉiu el ni alportis ion bongustan kaj sur la tablo estis riĉa kolekto de manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Post la abunda tagmanĝo fine ni trinkis konjakon. Jam komencis vesperiĝi kiam ni forlasis la domon de nia kolego. Ankaŭ tiam pluvis — etguta pluvo preskaŭ de la mateno. La stratoj estis malsekaj kaj ni atente marŝis.

La domo de nia kolego estis ĉe la urborando mem kaj ni rimarkis, ke unu kamiono, ŝarĝita per vestoŝranko, provis supreniri la krutajon. Post kelkaj malsukcesaj provoj la ŝoforo eliris el la budo kaj diris al la maljunaj viro kaj virino, kiuj marŝis post la kamiono:

— Mi nenion plu povas fari. Mi devas aŭ reiri al la bazo kaj elkamionigi la vestoŝrankon, aŭ mi devas lasi ĝin tie ĉi, kaj vi zorgu pri ĝi kiel vi povas.

Tiam ni, la triopo, unuvoĉe deklaris:

— Ni helpos, ni helpos — la distanco ne estas pli ol tridek metrojn! Ni transportos ĝin.

La ŝoforo rapide malŝarĝis la kamionon kaj liberigis sin de la vestoŝranko. Poste li retrodirektis la kamionon laŭ la strato kaj malaperis. Ni prenis porti la vestoŝrankon: du el ni — ĉe la malsupro kaj la aliaj — supre apogis ĝin. La maljunulo kaj la maljunulino helpis al ni, montrante la vojon kaj kuraĝige diris:

— Ankoraŭ malmulte, ankoraŭ malmulte restas!

Kaj la maljunulino nur ripetis ĝoje:

— Dio sendis vin. Dio sendis vin. Ni neniam povus solaj porti ĝin ĝis la domo.

Ni jam estis atingintaj la ĉirkaŭbarilon de la domo, kiam subite unu el ni, kiu subtenis kune kun mi la malsupran parton glitfalis, ni perdis la ekvilibron kaj la vestoŝranko falis diagonale sur la glitigan teron, renversiĝis kaj ruliĝis flanke de ni. Proksime estis ravino. Ni nur aŭdis fortan krakadon, batbruegon, disfaladon de lignopecoj kaj fine ĉio dronis en silento. Ni restis konsternitaj.

La maljunulino komencis vead:

— Ho, tutan vivon ni revis havi vestoŝrankon, sed Dio ne volis!

Ni komencis konsoli la maljunulinon, promesante, ke morgaŭ ili havos pli belan vestoŝrankon, kaj vere ni tre sincere volis fari tion, sed la cirkonstancoj ne ebligis al ni realigi nian intencon kaj ni ne plenumis nian promeson — aĉeti kaj donaci al ili alian vestoŝrankon.

Ĉiam, kiam pluvas tia etguta pluvo, mia konscienco turmentas min: „Vi nenion faris, vi nenion faris!“

Mia kuzo finis sian rakonton kaj dum certa tempo sidis silente kaj enpensiginte. Poste li rekomencis:

— Mi nun rememoras ankaŭ alian okazon. Foje, en urbo B., promenante kune kun mia frato sur la havena moleo, ni renkontis junan bele vestitan virinon, kiu ploris.

— Kio okazis, sinjorino, — ni demandis — ĉu ni povus helpi vin?

— Ho, lasu, lasu! — diris ŝi. — Se li ne povus helpi al mi, neniuj povus helpi. Kaj plorante ŝi direktis sin al la „Bulvardo“.

Ni daŭrigis nian promenadon kaj jen antaŭ ni ekstaris konata fiŝkaptisto — la „mara lupo“ Pepi.

— Ĉu vi vidis ŝin? — li demandis. — Ankaŭ mi vidis ŝin ploranta kaj demandis:

— Kial vi ploras? Kiu ofendis vin, sinjorino?

Kaj ŝi respondis:

— Neniu ofendis min, sed mi ĵus perdis familian relikvon — oran brakringon, pezan kaj multekostan.

— Kie vi perdis ĝin, sinjorino? Mi nepre serĉos ĝin, mi ĉion faros por trovi la relikvon!

Mi rapide demetis mian pantalonon kaj la ĉemizon kaj kiel vi vidas min — en bankostumo, mi jetis min en la akvon kaj komencis esplori la lokon, montritan de la virino.

Kredu al mi! Mi havis bonŝancon — mi vidis la brakringon kaj tuj metis ĝin en la poŝeton de la bankalsono. Mi ekĝojis, sed por ke la virino ne pensu, ke tio estas facila tasko, ĉar mi povus ne vidi tuj la brakringon, mi komencis brue aperi super la akvo kaj droni denove, certigante ŝin, ke mi serĉas obstine. Kiam tio tediis al mi, mi decidis eliri el la akvo kaj doni la

brakringon al la virino. Sed kiam mi estis ĉe la marfundo, mia konscienco ekparolis: — Pepi, atentu, vi havas edzinon kaj infanojn!

Mi eliris el la akvo kaj diris al la virino: — Sinjorino, mi faris ĉion eblan, sed bedaŭrinde mi ne trovis la brakringon! Maro! Granda kaj senfina!

Jes, konscienco! . .

M. ĈOBANOV

REPLIKO

KIAL „KROKODILI“ DUM KUNVENOJ?

Jam tre banala fariĝis simila frazo: „Kamaradoj, konsiderante la gravecon de la traktota demando, mi preferas paroli naci-lingve“. Plurfoje ĝis nun oni priridis kaj eĉ mokis tian motivadon, ĉar fakte nenio pravigas ĝin.

Ni provu analizi la motivojn de tia konduto kaj klopodu starigi konvinkajn kontraŭargumentojn.

Kial propre iuj parolantoj preferas uzi la gepatran lingvon?

EVENTUALAJ MOTIVOJ:

1) Ne posedante sufiĉe bone la Internacian Lingvon ili deziras eviti iujn mankojn, malgustojn aŭ erarojn;

2) Ne ĉiuj ĉeestantoj kapablas tuj kompreni ĉion;

3) En nacia lingvo oni esprimas sin pli klare kaj libere, pli konvinke kaj pli detale.

EVENTUALAJ KONTRAŬARGUMENTOJ:

1) Kio estas la plej grava dum E-kunvenoj? — memkompreneble tio estas nepra uzado de la Internacia Lingvo.

2) Kio altiras la societanojn al la E-kunvenoj? — la forta deziro kaj espero aŭdi kaj ĝui klaran, modelan kaj kompreneblan E-paroladon.

3) En kio konsistas la diferenco inter nacilingva parolado kaj E-parolado? — depende de la atingita nivelo ĝi povus esti kun aŭ preskaŭ sen eraroj, pli-malpli konciza kaj klara.

Se ni ignoras la relative malaltan procenton de la t. n. „eternaj komencantoj“, „krokodilado“ dum kunvenoj povus tedi la ĉeestantojn kaj malpliigi ties nombron.

Tre serioza tamen estas ankaŭ alia problemo: paroligi la ĉeestantojn.

Timante fari erarojn, iuj serioze sin ĝenas kaj ne kuraĝas libere aperi antaŭ publiko per prelegeto aŭ eldiro. Ĉi-rilate ofte kulpas iuj pli spertaj esperantistoj, kiuj tre emas tuj korekti aliulajn erarojn aŭ malgustojn. Simila konduto kaŭzas psikan traŭmon ĉe eventuala kuraĝulo, kiu poste ne plu alpaŝos al la tribuno aŭ almenaŭ dum longa tempo ne kuraĝos fari ĝin. Grava tasko de la spertuloj kaj precipe de la pedagogoj estas lasi tiajn personojn libere kaj senĝene paroli, se la eraroj ne kaŭzas miskomprenon.

La estraroj de la E-societoj devas stimuli kaj instigi sian anaron al libera parolado kaj prelegado. Volontuloj povus anticipe prepari sian verketon skribi, kaj, post konsultado kun iu pli sperta esperantisto, ili senĝene tralegos ĝin antaŭ publiko. Iom post iom ili fariĝos pli kuraĝaj, akirus pli da sperto kaj tute libere parolos en la kunvenoj.

Aliflanke, por ekposedi pli bone Esperanton, oni povus partopreni en kursoj por progresintoj. Laŭdinda ĉi-rilate estas la iniciato de k-do Asen Grigorov, kiu antaŭ multaj jaroj fondis Literaturan Rondon. Menciinda estas ankaŭ la Konversacia Rondo gvidata de St. Ganĉev, kaj precipe la Fluganta Rondo Konversacia, entuziasme gvidata de S. Heŝapĉiev.

Ni esperu, ke tiuj ĉi rondoj plivigliĝos sian agadon, ĉar ankaŭ la rezultoj certe estos fruktodonaj: iliaj membroj pliperfektigos sian konon de la Internacia Lingvo.

Eble nur tiam oni ne plu „krokodilos“ dum kunvenoj!

FLORI NIKOLOV

ZAMENHOFA SEMAJNO EN SOFIO

La sofiaj esperantistoj organizis semajnon, dediĉitan al la 122-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, kreinto de Esperanto. La semajno havis riĉan kaj varian programon. Ĝi komenciĝis per amika renkontiĝo en restoracio „Varna“. Estis toastoj, muziko, dancoj.

Okazis literaturaj legadoj. La ĉeestantoj ĝuis bonegan paroladon de spertaj E-verkistoj kaj poetoj. Sofiaj esperantistoj veturis gaste al siaj gesamideanoj en la apuda urbo Bankja, fama kuracloko. Tie estis parolado pri Zamenhof kaj la E-horo, gvidata de sia direktanto D. Terziev, prezentis unuhoran koncerton. Krom la esperantistoj, estis venintaj ankaŭ multaj amikoj de Esperanto kaj la salono estis plenplena. Post la koncerto estis muziko kaj dancoj.

En la klubejo de la urba E-societo „Maksim Gorki“ okazis bazaro de esperantajoj. Multaj esperantistoj el Sofio kaj el aliaj lokoj estis venintaj speciale por tiu arango. (Pri ĝi legu

apartan informon.) Samtempe estis prelego pri Zamenhof de M. Bacev.

En kinejo „Osvobodjenje“ okazis solena koncerto. Programon plenumis la E-horo, gvidate de D. Terziev. Kantis ankaŭ la E-kantistoj V. Damjanov, M. Angelova, St. Kalimenova K. Adamova kaj D. Denĉev. Sur la scenejo aperis ankaŭ la „Verdaj steletoj“ — infana E-grupo, gvidata de M. Elenov. Krome recitis versaĵojn kaj skeĉojn Angelina Sotirova, Belka Beleva, Mišo Zdravev k. a.

En la vasta klubejo de la Urba E-societo „Maksim Gorki“ okazis amuza vespero. La partoprenantoj pasigis la tempon en bonega humoro. Multfoje ĉiuj ludis viglajn bulgarajn rondodancojn.

Okazis ankaŭ la tradicia renkontiĝo de esperantistoj en la montodomo „Esperanto“ sur monto Vitoŝa, kie oni ĝuis la freŝan montaran aeron kaj mildan sunon.

M. BACEV

E-KONKURSOJ POR ORIGINALAJ KAJ TRADUKAJ POEZIO KAJ PROZO

Sur la paĝoj de la bulgaraj kaj alilandaj E-revuoj ofte aperas novaj nomoj de poetoj kaj verkistoj — kreantoj de originalaj E-poezio kaj -prozo. Inter ili estas nomoj ankaŭ de bulgaraj esperantistoj, distingitaj per premioj ĉe internaciaj literaturaj E-konkursoj.

La intereso al tiuj ĉi konkursoj konstante kreskas. Samtempe estiĝas ĉiam pli altaj la postuloj al la originala kaj traduka literaturo.

Konekse kun ĉio supre dirita BEA organizas en 1982 jenajn konkursojn:

1). Konkurso por originala kaj traduka poezio — 24-an kaj 25-an da aprilo 1982 en urbo Loveĉ (dum la „Siringa Vespero“).

2). Konkurso por originala kaj traduka prozo — 23-an kaj 24-an de oktobro en urbo Jambol (dum la „Vespero apud Tunĝa“).

La konkursojn rajtas partopreni personoj ne pli ol 50 jarojn aĝaj!

La materialojn por la konkursoj oni adresu

jenmaniere: 1303 Sofio, bul. „Hr. Botev“ 97, por la konkurso.

La materialoj estu subskribitaj per pseŭdonimo. En malgranda koverto enmetu vian nomon kaj adreson! La gluitan koverton entenantan la nomon kaj la adreson kaj la konkurso-materialon enmetu kune en pli granda koverto kaj sendu al la ĉi-supra adresoj!

La materialoj por la konkurso de originala kaj traduka poezio devas atingi la adresaton ĝis la 31-a de marto 1982, kaj la materialoj por originala kaj traduka prozo — ĝis la 1-a de septembro 1982.

Kompetenta jurio pritaksos la prezentitajn konkursaĵojn kaj aljuĝos I, II kaj III premiojn por poezio (originala kaj traduka) kaj I, II kaj III premiojn por prozo (originala kaj traduka).

Estos aljuĝitaj ankaŭ du kuraĝigaj premioj.

La E-societo „Diĉo Petrov“ en Ĉepelare nombras 50 esperantistojn. La societo havas propran novan klubejon, kiu multe kontribuas al la realigo de la riĉa kaj varia agado de la esperantistoj. Ĝiaj ĉambroj estas bone kaj komforte meblitaj kun konvena ornamado. En ĝia biblioteko estas multaj E-libroj, inform-libroj, albumoj. Krome, tie oni konservas ankaŭ la riĉan arkivon de la malnova esperantisto Stojan D. Marev. En la instruado estas instrutabuloj kaj lerniloj, ankaŭ nuntempaj ITR (Instruteknikaj rimedoj), ekz. magnetofono, gramofono kun E-diskoj, radioricevilo, projekciaparato, skribmaŝinoj k.a., kiujn oni utiligas dum la E-instruado.

Ekde la 1-a de oktobro 1981 en la urbo funkcias tri kursoj por lernado de la E-parolo kaj -kanto, kiujn gvidas la konata esperantisto Dimitar Marev, emerita instruisto. Du el la kursoj estas en lernejo „Diĉo Petrov“ kaj en la Sportista lernejo, ambaŭ kursoj estas por komencantoj. La tria kurso estas por E-progresintoj.

La kultura agado de la esperantistoj en

Ĉepelare estas riĉa kaj varia. Oni organizis mandolinorkestron kaj kantgrupon el 15 personoj, kiuj sin preparas por partopreni diversajn arangojn (datrevenojn, festojn, renkontigojn, kunvenojn kaj naskiĝtagojn. Ambaŭ trupoj partoprenis la naciajn E-festivalojn en Loveĉ kaj en Pazarĝik, kie ili gajnis duan kaj trian premiojn.

Speciale menciinda estas la individua sinprezento de la esperantistoj, ricevintaj diversajn premiojn, ekz. Mariana Petrova, Toni Stoiĉkova, Mariana Marĉeva, Valka Sirakova, Hristina Darmoneva, Viktor Andreev kaj aliaj. Nun oni sin preparas por partopreni la E-festivalon en Pleven en 1982, dediĉitan al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov.

Krome la E-societo organizis diversajn laborejojn, en kiuj laboras 35 personoj.

Per sia tuta agado la esperantistoj el Ĉepelare konscie laboras por plenumo de la taskoj, starigitaj de la CE de BEA.

MARIA DIČEVA

UTILA RENKONTIĜO

Antaŭ nelonge laŭ iniciato de la Komisiono por Turismo ĉe Bulgara Esperantista Asocio, okazis utila renkontiĝo inter la Ĝenerala direktoro de la turisma komplekso „Balkan-turist“ — „Itinero-Hoteloj“, Sofio, Anastas Karolev kaj la vicprezidanto de BEA ing. Petar Todorov. La dialogo koncernis la Internacian Turismon kaj la aplikon de Esperanto en ĝi.

Dum la konversacio la Ĝenerala direktoro sciigis, ke en ilia kapacita bazo, konsistanta el 67 hoteloj, 9 moteloj, 12 kampadejoj kaj multaj privataj ĉambroj, dum la 9 monatoj de la k. j. estis akceptitaj kaj priservitaj pli ol unu miliono kaj duono da gastoj, el kiuj proksimume 640 mil turistoj el aliaj landoj.

Konekse kun la Deklaro de Manilo, A. Karolev opinias, ke se tiun ĉi iniciaton akceptus per la necesaj seriozeco kaj respondeco ĉiuj turismaj organizadoj laborantaj en la sfero de Internacia Turismo, tiam Esperanto povos esti sukcese aplikata en la praktiko paralele kun la aliaj lingvoj.

K-do Karolev en siaj junulaj jaroj estis aktiva esperantisto kaj delegito de UEA. Nun la ofica posteno denove starigas lin en rekta kontakto kun Esperanto.

La kono de fremdaj lingvoj kaj Esperanto estas necesa ankaŭ por la oficistoj en turisma komplekso „Itinero-Hoteloj“, kaj tio estas tasko por estonta komuna agado tiudirekte.

D. Mutuŝev

E-VESPERO EN RUSE

En Ruse okazis E-vespero dediĉita al la 66-a UK de Esperanto, kiu okazis ĉi-jare en Brazilo.

Prelegon kun prezento de koloraj diapozitivoj pri Brazilo — la lando-gastiganto de la kongreso, faris ing. Petar Todorov, vicprezidanto de BEA, kiu partoprenis la laboron de tiu ĉi monda E-forumo. Li emfazis, ke la ĉefa pridiskutata temo en la fakaj sekcioj de UEA estis la problemo pri la rolo de Esperanto kiel pontlingvo inter la naciaj kulturoj, kiel rimedo por interkomprenigo kaj kunlaborado inter la popoloj.

Por la ĉeestantoj estis agrable aŭdi, ke la preleganto persone informis la UK de UEA pri la laboro kaj la decidoj de la okazinta ĉi-jare en Ruse III-a Konferenco de Medicinistoj-esperantistoj. Tie, en fora Brazilo, oni alte prilaksis la kreitajn bonajn kondiĉojn por sukcesa okazigo de la konferenco en Ruse.

Elena Kazangieva

En la sepa numero de „Zari“ — organo de la Blindula Asocio en Bulgario, aperis informo pri malgranda, sed solena festeto, okazinta en la blindul-lernejo „Georgi Dimitrov“ — Varna. Oni fermis la Esperanto-kurson por komencantoj. Ceestis la direktoro, instruistoj, reprezentantoj de la legejo „Lui Brajl“ — Sofio kaj la prezidanto de la loka blindula Esperanto-societo.

La gelnantoj kantis esperantajn kantojn. La kursgvidanto docento Georgi Dimov akompanis per violono.

„Unuafaje mi gvidas Esperanto-kurson por blinduloj — diris la docento. — Mi dankas al la gelnantoj pro ilia diligenteo kaj ambicio, dank'al kiuj ili libere skribas, legas kaj parolas Esperante.“

Mi devas diri, ke pli multe docento Dimov meritas nian dankon pro la bona laboro kaj bonaj rezultoj. Dankon meritas ankaŭ la estraro de la legejo „Lui Brajl“, kiu pagas la elspezojn por la kurso, kaj la lernejestraro, kiu laŭbezzone helpas.

En la lernejo funkcias du Esperanto-kursoj — por komencantoj kaj por progresintoj.

Esperanto ĉiam ludis gravan rolon en la vivo de blinduloj. Antaŭ sesdek jaroj kelkaj blinduloj, pere de Esperanto, korespondis kun eksterlandanoj, informigis pri iliaj organizaĵoj, kaj profitante ilian sperton, fondis la Asocion de Blinduloj en Bulgario. Pro tio la organizaĵoj de blinduloj ĉiam havas bonan rilaton al Esperanto.

Todor Ŝoŝev

E-BAZARO EN SOFIO

La Sofia E-Societo „M. Gorki“ organizis la unuan en la urbo Bazaron de esperantaĵoj, kiu okazis la 16-an de decembro 1981 en la granda societa kunvenejo ĉe strato „Serdika“.

Kelkaj esperantistoj, inter kiuj Nikola Nikolov, Metodi Pančev kaj Simeon Hesapčiev, elmontris siajn esperantaĵojn. La alvenintaj esperantistoj havis la eblecon trarigardi rarajn, malnovajn E-librojn kaj aĉeti iujn el ili, aĉeti ankaŭ E-bildarkojn, E-glumarkojn, emblemojn kaj insignojn.

Reprezentantoj de diversaj E-societoj metis florojn antaŭ la granda bela portreto de Zamenhof lige kun la 122-jara datreveno de lia naskiĝo.

Vespere en la sama salono okazis granda solena kunveno omaĝe al la Internacia Tago de la E-libro. Festparolis pri la vivo de L. L. Zamenhof Marin Bacev, sekretario de IS ĉe BEA.

Je la 12-a de novembro 1981 la membroj de E-societo „Todor Sofroniev“ en Plovdiv festis la unujaran datrevenon de ĝia fondo. La modesta solenaĵo, okazinta en la klubejo de la societo, komenciĝis per arta programeto de gelnantoj el lernejo „Jane Sandanski“. Rememorojn pri la patrono de la societo, la komunista-esperantisto Todor Sofroniev, pe-reinta en la batalo kontraŭ la faŝismo, rakontis lia frato Krastjo Sofroniev kaj lia kunbatalanto Kiril Donev.

Estis farita informo pri la sukcesoj de la produktadlaboro de la societo. Esperanto-societo „T. Sofroniev“ estis fondita je la 1-a de novembro 1980 kun celo organizi produktadon. La kolektivo, kiu nun nombras pli ol 100 personoj, laboras tre bone kaj plenumis la jarplanon pri la gajno por 7 monatoj.

Al la organizota ĉe la societo foto-kinoklubo oni faris valorajn donacojn. La brigado de P. Petrov donacis kinokameron „Krasnodarsk“ kaj la brigado de B. Donev — fotokameron.

Vasil Dabov

SUKCESA LERNOJARO

La estraro de E-societo „D. Sasonov“ en Asenovgrad havas kompletan planon por E-instruado, kiun oni realigas en praktiko. Nun en la urbo funkcias 7 E-kursoj.

Plej vigla estas la kurso en mezlernejo „Lenin“, gvidata de V. Ĉirpanska. Tie oni unuan fojon instruas Esperanton fakultative kaj tio ĝojigas ĉiujn lokajn esperantistojn. Plej granda grupo da lernantoj, partoprenanta la E-kurson, estas el 9-a klaso. Bonege estas, ke kune kun la lernantoj-kursanoj venas ankaŭ ilia klasgvidantino Rozka Dimitrova, kiu multe helpas al nia E-laboro kaj sekvontjare ankaŭ ŝi gvidos E-kurson en la lernejo.

En la urbo funkcias ankaŭ du E-kursoj por civitanoj, gvidataj de Ikonomova kaj S. Filaretova.

Aliaj E-kursoj funkcias ankaŭ en la lernejoj „N. Vapcarov“, „Nevena Jordanova“ kaj „Otec Paisij“, kiujn gvidas Velurina kaj Emil Ĉirpanski.

Laŭ la proverbo, bona komenco garantias duonan sukceson... Do nia bona komenco estas jam pasinteco — ni atendas plenan sukceson.

Emil Ĉirpanski

Vojaĝi estas bona hobia

Dum la 15-a konferenco de ILEI okazinta en julio 1981 en Gödöllő, Hungario, la famkonata vojaĝanto kaj verkisto Mag. Tibor Sekelj, (Jug.) faris lumbildprezentadon pri sia vojaĝo tra Papuolando (Novgvineo).

Post la lumbildprezentado multaj ĉeestantoj faris demandojn konekse kun lia vojaĝo. Nia redakciano Marin Bacev, en amika konversacio kun la fama vojaĝanto, same starigis al li kelkajn demandojn, al kiuj Mag. Tibor Sekelj estis afabla respondi.

— Kiam aĝa vi estas kaj kie vi naskiĝis?
— Mi estas 69-jara. Mi naskiĝis en Spiska Subota en la iama Aŭstro-Hungario, nuntempe en Ĝeĥoslovakio.

— Kiam kaj kie vi lernis Esperanton?
— En 1929, en Zagrebo.
— Kiom da jaroj vi vojaĝis?
— Ĉirkaŭ 25 jarojn...
— Kiomfoje vi estis en ekzotikaj landoj?
— Pli ol 100-foje.
— Kiom da landoj vi vizitis dum viaj vojaĝoj kaj kiujn?

— Ĝis nun mi vizitis 89 landojn. Vi mem komprenas, ke nombri ilin estus enuige, ĉu ne?
— Ĉu foje vi estis en vivdangero?

— Mi estis en vivdangero ĉirkaŭ 30-foje.
— Kiun vian travivaĵon vi konsideras plej interesa?

— Plej interesaj estas miaj travivaĵoj, ligitaj kun la momentoj en vivdangero. Ilin mi priskribis en mia libro „Mondo de travivaĵoj“, kiu jam aperis ankaŭ en hungara traduko.

— Kiujn ekzotikajn landojn vi planas baldaŭ viziti?

— Post kelkaj tagoj mi forveturos al Brazilo. Poste al Venezuelo, Kubo kaj Usono, kvankam la lasta tute ne estas „ekzotika“ lando...

— Ĉu laŭ via opinio vojaĝi estas bona hobia?

— Ho, jes! Tio estas tre bona hobia, se estas ĝusta kialo kaj bona preteksto por ĝi.

— Ĉu vi havas aliajn ŝatokupojn?

— Mi estas etnologo, muzeologo kaj

kolektanto. Mi kolektas etnologiajn objektojn de tri specoj: 1) ĉapo kaj ĉapeloj; 2) ritualaj maskoj kaj 3) popolaj muzikinstrumentoj. Krome mi ŝatas sporton — precipe alpinismon. Mi dufoje venkis la plej altajn suprojn de Ameriko, ankaŭ la plej altajn vulkanojn de Meksikio. Mi ankaŭ grimpadis sur Himalajon.

— Ĉu vi havas „malbonajn“ hobiajn?
— Ho, tute nel Mi neniam trinkis alkoholaĵojn, nek iam fumis.

— Kiom da libroj vi aperigis en Esperanto kaj kiom en naciaj lingvoj?

— Aperis 20 miaj libroj en pli ol 80 eldonoj, el kiuj 8 originale verkitaj en Esperanto kaj tradukitaj en 23 lingvojn. (Bedaŭrinde ĝis nun neniu mia libro estas tradukita en bulgaran lingvon...).

— Kiu el viaj libroj estas plej interesa laŭ via opinio?

— Ĉar ni ambaŭ partoprenas Konferencon de instruistoj, mi respondos, ke plej interesa por infanoj estas mia 60-paĝa romano „Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo“, kiu aperis ĝis nun en 15 lingvoj.

— Kiom da lingvoj vi parolas krom Esperanto?

— Krom Esperanto mi bone parolas 9 eŭropajn lingvojn, kaj iomete — ankoraŭ dekdono da ekstereŭropaj lingvoj.

Fininte la interesan interparolon, mi petis Mag. Tibor Sekelj pri aŭtografo por miaj legantoj. Amikajn salutojn!

Tibor Sekelj
Gödöllő,
16.7.1981

INTERNACIA DEKLAM-KONKURSO

En la kadro de Monato de Paco kaj Amikeco, kiu okazos la 29—30-an de majo 1982, inter diversaj programoj okazos ankaŭ internacia deklamkonkurso, organizita de la Packomisio de HEA, Departementa Komitato de Hungara Esperanto-Asocio je Csongrád kaj loka Esperanto Grupo de Szentes (Sentes).

Oni rajtas partopreni per poemoj kaj tradukoj nur el la verkoj de Kolomano Kalocsay.

Fontmaterialo troviĝas en la ĵus hungarlingve eldonita libro „Tutmonda Sonoro“. Sin anonci

oni povas en tri kategorioj: infana, junula* ra kaj plenaĝula kun du libere elektitaj poemoj, unu nepre citu pactemon.

Por la aliĝa registro oni tuj anoncu, sed nepre ĝis la mezo de aprilo en 1982. Detalojn petu kaj adresu al

„Ifjusági Ház igazgató“
Esperanto Pademonstracio
SZENTES
H-6600 HUNGARIO

VERDAJ STELETOJ

UNUA NEĜO

Antaŭ tre longa tempo en Afriko vivis knabineto, kiu neniam estis vidinta neĝon. Sia nomo estis Aminata.

Foje Aminata promenis kune kun sia hundo en la ĝardeno. Si estis tre-tre malgaja.

— Kial vi estas malgaja? — demandis ŝin la hundo. Ĝia nomo estis Kunulu.

— Eble ĉar mi neniam en mia vivo vidis neĝon...

— Gav! Ankaŭ mi!

— Ho, kiel mi dezirus vidi neĝon! — sopire diris Aminata.

La saman vesperon, kiam Aminata kaj Kunulu iris dormi kaj en la ĝardeno estis neniuj, la floroj komencis interparolon.

— Ĉu vi aŭdis, — diris la rozo al la helviola krokuso. — Aminata neniam vidis neĝon.

— Vidu nur! — kapjesis responde la krokuso.

— Tia aminda kaj bona knabineto, — aldonis la lekantoj. — Ĉi ĉiun vesperon surverŝas nin per akvo.

— Ni devas fari ion! — decidis la floroj.

— Mi scias kion fari! — diris la Suda vento, kiu ĉi-vespere same promenis en la ĝardeno. — Atendu min, mi baldaŭ revenos!

Kaj ĝi forflugis norden. Tre-tre malproksimen, trans dezertoj kaj montaroj, trans maroj kaj ebenajoj, trans arbaroj kaj glaci-kovritaj tundroj, al la norda poluso, kie loĝis la Norda vento.

— Kion vi bezonas? — miris la Norda vento. — Tuj foriru, alie mi kaptos vin!

— Nu, kaptu min! — gaje kriis la Suda vento kaj ekflugis returnen.

La Norda vento sin jetis por persekuti ĝin. Sed la Suda vento estis facilmovo kaj flugis pli rapide. Ĝi rapidis hejmen, al Afriko, kaj la Norda vento ne sukcesis atingi ĝin. Sed ĝi kunportis tian malvarmon, ke eĉ la nuboj glaciĝis kaj sur la tero anstataŭ pluvo komencis fali neĝo.

Blankaj lanugaj neĝfloketoj!

Matene Aminata kune kun sia hundo venis en la ĝardenon kaj vidis, ke ĉio ĉirkaŭe estas blanka.

— Vidu, Kunulu, kia beleco! Ĉio estas blanka, mola kaj lanuga. Certe tio estas neĝo?

— Gav! Certe, — konsentis Kunulu.

Kaj la Suda vento, lacega post la longa promeno, kaŝis sin en la hunda dometo por iom ripozi.

La Norda vento longe atendis la aperon de la Suda vento. Finfine al ĝi tedis la atendado kaj ĝi forflugis al la Norda poluso.

Tuj aperis la suno, la neĝo degelis, kaj la ĝardeno denove estiĝis florplena.

DONALD BISSET

LEPORETOJ


Sidas sur herbejo leporetoj
kun atente streĉaj oreletoj . . .

Se mi havus oreletojn,
kiel tiuj leporetoj,
aŭdis mi ja karan panjon,
kiam vokas min kaj Anjon, —
kiel tiuj leporetoj,
leporetoj-grizuletoj.

Saltas sur herbejo leporetoj,
per petole viglaj kvar kruretoj . . .

Se mi havus kvar kruretojn
kiel tiuj leporetoj,
ĉiam mi senĉese saltus,
por ripozi mi ne haltus,
kiel tiuj leporetoj,
leporetoj-roduletoj.

Origine verkis: LJUBA BOJAĜIEVA



ANEKDOTOJ POR INFANOJ

La patrino demandas sian filon-unuaklasanon:

— Nu, kiel pasis la unua lernotago?

— Panjo, la instruistino ne povas kalkuli. Unue ŝi diris, ke du kaj du faras kvar, kaj poste — ke tri kaj unu faras kvar . . .

En la atendejo de stacidomo, vintre, infanoj finfaris neĝhomon. La staciestro riproĉis ilin:

— Kial vi faris la neĝhomon en la atendejo?

— Ĉar ekstere ĝi povus degeli . . .

Petro disputas kun sia fratineteto. La patrino konvinkas lin:

— Vi estas pli aĝa, vi devas cedi!

Je la vespero la patrino disputas kun Petro, kaj fine li diras:

— Panjo, vi estas pli aĝa, vi devas cedi . . .

LINGVO DE INTERNACIA TURISMO

la bultenon, kiu aperados kvarfoje en la jaro laŭ sezonoj. Oni kun kontento konstatis, ke por la unua fojo estas ricevataj tiom frue multaj informoj pri internaciaj E-aranĝoj.

La dua volumo de turista kantar aperos en Hungario post duonjaro, en eldonkvanto de 5 000 ekzempleroj. Oni eldonos ankaŭ informojn kaj propagandilojn pri „Monda Turismo“ kaj pri E-turismo. La estraro prizorgos la eldonon en laŭeble pli multaj landoj de la baza Esperanto-konversacilibro por turistoj, kiun jam aperigis en 50 000 ekzempleroj la Stata Hungara Komitato pri Turismo. Ĝi aperis ankaŭ en pola lingvo kaj nun oni klopodas ĝin eldoni en Bulgario.

La estraro de „MT“ nuligis la kolektadon de aligkotizoj kaj fiksas la jarkotizon por individua membro je dek internaciaj respondkuponoj, pagatan per landa valuto.

Post pridiskuto de raporto pri agado de kandidatoj por premioj de la MT-konkurso estis aljuĝitaj premioj al 1 anglo, 4 hungaroj, 2 poloj kaj el Bulgario Dimitar Mutuŝev — prezidanto de Komisiono por turismo ĉe Bulgara Esperanto-Asocio. La premioj estas senpagaj partoprenoj en internaciaj E-aranĝoj, inkluzive senpaga partopreno en la UK en Antverpeno, kaj 7 senpagaj tranoktoj en Bruselo dum la UK.

La regularo de la konkurso estis simpligita, por ke pli da personoj partoprenu ĝin. En 1982 oni disdonos dudek premiojn — senpagaj partoprenoj en turismaj aranĝoj en Svedio, Finnlando, Pollando, Hungario, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario. La regularo kaj aliaj informoj pri la konkurso aperos en la kalendaro 1982 de MT.

La 27-an de oktobro k. j. Nikola Nikolov — ĝenerala sekretario de Monda Turismo, aranĝis koktelon okaze de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. Ĝin partoprenis MT-estraranoj kaj la foiranaro.

La plenumado de la konkretaj kaj celkonformaj decidoj kaj rekomendoj de la ĉi-jara foiro kaj de la estrarkunsidoj de Monda Turismo estas garantio, ke dum la konferenco de la Monda Organizaĵo por Turismo, kiu okazos en Meksikio en 1982, oni raportos pri aktivigo kaj plivigliĝo de la internacia E-turismo kaj pri pli ampleksa uzado de Esperanto kiel lingvo de turismo.

N. ILIEV



Tio estis slogano de la 7-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo. Ĝi okazis de la 18-a ĝis la 25-a de oktobro 1981 en Varsovio. La foiron partoprenis organizantoj de E-turismo el la eŭropaj socialismaj landoj, el Belgio, Italio, Svedio kaj Finnlando.

Pola Esperanto-Asocio kaj ties vojaĝoficejo „Esperantotur“ multon faris por la bona organizo kaj efektiveco de la foiro. La partoprenantoj povis trankvile diskuti, debati, agadi, manĝi kaj dormi en hotelo „Nova Prago“.

Oni faris trarigardon de la organizita E-turismo en 1981. Estas konstatite, ke tie kie tiun ĉi specon de turismo prizorgas salajrataj oficistoj, ĝi rapide evoluas kaj prosperas. Ekzemple la partoprenantoj en la foiro estis informitaj, ke vojaĝoficejo „Esperantotur“ en 1981 perlaboris preskaŭ 30 milionojn da zlotoj kaj planas, ke en 1982 tiu ĉi sumo estu 50 000 000 da zlotoj. En tiu ĉi oficejo laboras profesie kelkaj personoj sub la lerta gvidado de A. Grzebowski, kiuj subtenas konstantajn rilatojn kun la Internacia Esperanto-Kursero en Bulgario. Ankaŭ en Hungario oni konstatis, ke per amatora kaj libervola aktivo oni ne povas disvolvi amasan organizitan E-turismon. Pro tio ili jam klopodas starigi specialigitan vojaĝoficejon en la kadro de la junulara turisma oficejo „Ekspreso“. Apud Budapeŝto la esperantistoj akiris kontraŭ malgranda lupago 10-dekaran parcelon, sur kiu aranĝas Esperanto-kampadejon. Estas malkompreneble, ke tie deĵoras salajrataj personoj.

Dum la foiro estis subskribitaj duflankaj kaj multflankaj interkonsentoj pri kunlaborado sur la turisma kampo kaj pri sendo de grupoj al internaciaj E-aranĝoj.

En la foiraj tagoj okazis du estrarkunsidoj de la asocio „Monda Turismo“. Oni traktis organizajn problemojn, aprobis regularon por agado de landaj reprezentantoj kaj landaj sekcioj. La asocia kalendaro 1982 estis redaktita. Ĝi aperos en 5000 ekzempleroj. Ĝin ricevos ĉiuj membroj de la asocio same kiel

ISSN—0204—8701

